

# Ni pagas € 17 MILIARDOJN jare al la Brita Ekonomio!

## Estimata parlamentano!

En oktobro 2005 publikiĝis aparte interesa raporto, franclingve legebla ĉe [http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport\\_Grin.pdf](http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf), de prof. François Grin el Svislando. La plej okulfrapa konkludo de la raporto estas *ke pro la nuna internacia superregado de la angla lingvo Britio gajnas ĉiujare € 17-18 miliardojn, kio estas pli ol triobla fama brita rabato, aŭ 1% de ĝia malneta nacia produkto*. Alivorte, ĉiu el la 394 milionoj da ne-anglalingvanoj de EU, inter ili la loĝantoj de la plej malriĉaj novaliĝintaj landoj, jare subvencias la britan ekonomion!

Tiun kvanton ĝi ricevas el la vendado de libroj kaj de aliaj varoj ligitaj al la angla lingvo kaj el la 700 000 homoj ĉiujare vizitantaj Anglion por lerni la lingvon, krome ankaŭ el la ŝparoj devenantaj de la neglektado de la fremdlingva instruado en la britaj lernejoj. Ne temas pri la tuto de la ekonomiaj transpagoj al la Unuiĝinta Reĝlando pro lingvaj kaŭzoj, sed pri 75 % el ili, kion la aŭtoro taksas kiel frukton de la hegemonio de la angla kaj ne nur de la demografia pezo de la lingvo mem.

La profesoro de la Ĝeneva Universitato kaj specialisto pri lingvoekonomiko **François Grin** publikigis ampleksan dosieron, kie li analizas la lingvan politikon de Eŭropa Unio. La studon petis kaj eldonis la **Alta Konsilio pri Taksado de la Instrusistemo** [- france: **Haut Conseil de l'évaluation de l'école** -], franca publika organizaĵo aŭtonoma, kiu taksas kaj analizas la staton de instruado en Francio. La raporto starigas la demandon: *kiu estus la optimuma elekto pri la laborlingvoj en Eŭropa Unio?*

## Per pli justa sistemo EU ŝparus minimume € 25 miliardojn jare!

La svisa ekonomikisto proponas komparon inter tri eblaj scenaroj:

1. *la angla kiel sola lingvo;*
2. *la multlingveco;*
3. *la elekto de Esperanto kiel interna laborlingvo en la EU-organoj.*

La tria ebleco, Esperanto, aperas, kiel la plej malmultekosta kaj egalrajta, sed Grin opinias ĝin nuntempe neebla pro la fortaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, bazitaj sur simpla nescio. Tamen, li opinias ĝin strategie ebla por nova generacio, je du kondiĉoj:

- Grandskala kaj daŭra informkampanjo tra la tuta EU pri lingvaj malegalecoj kaj Esperanto.
- Kunlaboro de ĉiuj membro-ŝtatoj en la kampanjo.

Tio povus gvidi al **neta monŝparo por EU je ĉiujare ĉirkaŭ € 25 miliardoj! "85% de la loĝantaro de Eŭropo de la 25 havas en tio rektan kaj evidentan intereson"**, Prof. Grin asertas.

Amike,

Margareta Handzlik, EU-parlamentanino, [mhandzlik@europarl.eu.int](mailto:mhandzlik@europarl.eu.int)

Prof. Renato Corsetti, Universala Esperanto-Asocio, [Renato.Corsetti@uniroma1.it](mailto:Renato.Corsetti@uniroma1.it)

D-ro Seán Ó Riain, Eŭropa Esperanto-Unio, [sean.oriain@web.de](mailto:sean.oriain@web.de)

**PS. Esperanto por helpi lerni aliajn lingvojn: [www.springboard2languages.org](http://www.springboard2languages.org)**

Bruselo, 22an de majo 2006